

TELOPEO

La Oficiala Gazeto de la Esperanta Federacio de Novsudkimrio

Telopeo Volumo 57 Numero 05
vendrede je la tridek-unua de decembro 2021
Esperanto House 143 Lawson Street REDFERN NSW 2016 AUSTRALIA
Redaktoro: Maria TERANO, Provleganto: Nicole ELSE

Enhavo

Telopeo	1
1 Grava ĝisdatigo pri la venonta aŭstralia kaj nov-zelanda kongreso _____	2
2 Ĉirkaŭ la Mondo kun Esperanto _____	3
3 Devigaj Vakcinoj _____	4
4 Ĉu mi vakciniĝu kontraŭ KroViM-19? _____	10
EFNSK	13

Grava ĝisdatigo pri la venonta aŭstralia kaj nov-zelanda kongreso

Nicole ELSE, sekretario de EFNSK

Pro la lastatempa kresko de ĉiutagaj (raportitaj) KroViM-kazoj en NSK, ni decidis fari la kongreson virtuala por ĉiuj (anstataŭ « hibrida »). La plej nova versio de la programo estas ĉe <https://esperanto.org.au/anzek2022-programo.html>. Ni uzos la samajn Zoom-ligilojn por ĉiu sesio ene de la unu tago, krom la Esperanto-kurso de Alekso MILLER. Tio uzos la saman Zoom-ligilon dum la tutaj 5 tagoj. La malferma sesio de la kongreso okazos **10:00 sabate je la oka de januaro 2022 (laŭ sidneja tempo: UTC+11)** Se vi ne jam registriĝis, bonvolu fari tion, kiel eble plej baldaŭ, per la ĉefa kongresa paĝo, <https://esperanto.org.au/kongreso>.

Ĉirkaŭ la Mondo kun Esperanto

Dmitry LUŜNIKOV, direktoro de EFNSK

Parto 3. Tesaloniko, Grekio



Tesaloniko estas la ĉefurbo de Makedonio. Post Ateno ĝi estas la dua plej granda urbo de Grekio. La urbo havas tre longan kaj interesan historion, belan havenon kaj multajn vidindaĵojn.

Ekzistas esperantistoj en la urbo kaj mi provis kontakti ilin. Bedaŭrinde neniu respondis. Tamen mi trovis en interreto ke en Tesaloniko ekzistas kafejo Esperanto. Kompreneble mi vizitis ĝin kaj iomete babilis kun la posedanto de kafejo, Nestor. Mi demandis lin, kial la kafejo estas nomata Esperanto. Nestor respondis, ke li serĉis internacian nomon por kafejo kaj decidis, ke la nomo Esperanto estas tre taŭga.

Do, vizitu Tesalonikon kaj havu matenmanĝon en kafejo Esperanto!

Devigaj Vakcinoj

Anonima

Mia bofratino estas en hospitalo kun miokardito. Ŝi havas problemojn marŝi kaj eĉ iel aktivi kaj verŝajne neniam resaniĝos sufiĉe por labori denove. Ŝi estis korflegistino en la kora sekcio de St George Hospital kaj malsaniĝis post ricevo de la piko. Ŝi diris al ni, ke estis 1 aŭ 2 kazoj de miokardito jare en la koro-sekcio kaj nun ili vidas tiom multe ĉiusemajne pro la vakcino. Bedaŭrinde miokardito estas nur unu rezulto de vakcinoj.

Mi ne kontraŭas la rajton de iu havi vakcinon, kaj por maljunuloj ŝajnas ke ĝi estas bona. Tamen la risko de la vakcino por junuloj estas multobla la risko de KroViM. [1] povus okazi iu ajn problemo en la estonteco.

Ni kalkulu! Laŭ la CDC la risko por 75-jaraĝulo estas 220-obla de 18-jaraĝulo. Se ĝenerale unu el cent mortas se infektita, por infektita junulo la risko de morto de KroViM estas do preskaŭ nenio aŭ $0,000045 (= \frac{1}{221} \times 0,01)$. [2]


Nu, ĉar la forteco de la vakcino pli malgrandiĝas post monatoj, eĉ tiu kiu havis la vakcinon eble estas en pli da danĝero, ĉar ŝajne la vakcino malbonigas la imunon sistemon kaj eĉ povas instigi la kreskon de kanceraj. [3]

Fakte, eminenta imunosciencisto el Melburno rekte diris ke la vakcinoj ne povas bone funkcii. [4] Ĉi tiu artikolo mencias la kreskon de infektatoj inter la vakcinitoj: [5].

La plej bona solvo estas kiel ĉiu alia jaro de gripo, protekti la grandaĝulojn kaj lasi la gripo rapide preter pasi. Por tiuj kiuj havas ĝin severe, kompreneble la Ivermektino estus uzbla por bone kuraci se la TGA permesus tion.

Ekzemplo de korupteco montriĝis, kiam oni faris malgrandan rapidan meta-studon pri Ivermektino por anonci, ke ĝi bezonas pli da studo, kvankam multegaj studoj pri ĝi kaj alia meta-studo kontraŭis tiun konkludon, kaj la memevidentaj rezultoj montras, ke ĝi bone funkcias.

Jen la plej oficiala kaj supozeble «fidinda», kiu havas konkludon, kiu ne rilatas al la datumoj: [6]. Jen la klare pli ĝusta kun la mala rezulto: [7]. Por vidi ĝian efikecon vidu la rezultojn en similaj Barataj ŝtatoj. Kaj notu: Sen kresko de krom-efikoj! Du el la tri provincoj montrataj uzas Ivermektinon. Ĉu vi povas diveni kiujn? Aliaj landoj, kiuj uzas Ivermektinon estas Peruo, Paragvajo, kaj Makedonio, se vi volas pli eltrovi. [8]



Utar-Pradeŝo kaj Delhio spertis nekredablajn malgrandiĝojn en KroViM kazoj ĉar ili uzas ivermektinon frue kaj prevente. Kvankam Kerala, eta ŝtato en suda Barato, kiu tro dependas de vakcinoj kaj malpli dependas de ivermektino, raportas signifan pliiĝon de KroViM-19-kazoj.

Nun en Usono la novaj kazoj en ĉiu tago estas 100.000. Nun la taga nombro de mortoj en Usono pro KroViM estas eble 7-obla de la tuto de Barato!

Mi aŭskultis bonegan eksplikon, kial homoj aŭskultas la oficialan rakont(um)on, kiu estas tro influita de aĉetita scienco.

Kvankam ĝenerala angoro ekzistas en la komunumo, kiam okazas granda timo, la popolo kaptas la solvon donitan de la registaro sen kritikaj pensoj.

Hipnote la fokuso kaptiĝas de tiu solvo kaj oni ne povas pensi logike, sed nur emocie. La sekva ligo eksplikas tion tre bone. [9] Lernu pri amasa psikozo je ĉi tiu ligo: [10]. Estas kontrolado de la voĉoj en nia societo nun grandskale. Hospitaloj, kuracistoj, politikistoj, firmaoj ne povas fari tion, kio estas plej justa. Vidu la videon ĉi tie por ekspliko de kiel la kontrolado nun okazas. [11]

Amikoj ofte sendis al mi kontraŭvaccinajn ligojn al informo en Fejsbuko kaj mi ne povas vidi ilin, ĉar ili malaperis. Ankaŭ certe vi rimarkis, ke la ĝenerala novaĵo neniam mencias ion krom bona novaĵo pri la vakcinoj kaj kritikis kiel frenezulo tiun kiu havas alian vidpunkton.

Bedaŭrinde ni ne plu povas fidi eĉ la « plej fidata novaĵo » de la ABC. Vidu la Telegraman grupon « [World Doctors Alliance](#) » por ne cenzurita informo.

La Novjorka decido kontraŭ la kromaj plifortigaj dozoj diris, ke la vakcino mortigis du homojn por ĉiu savata, kaj tio ne inkluzivas la terurajn kromefikojn, kiuj nun aperas hazarde (sen mencio en la ĉefaj amaskomunikiloj).

Doni la vakcinon al infanoj aŭ eĉ junuloj estas tute stulte. Ĝi havas riskon por la junuloj kaj krome se ĝi iel funkcias, ĝi malrapidigas la disiĝon de la viruso kaj la maljunuloj estos en danĝero pli longe. Natura imuneco estas 13-oble pli forta ol tiu de la vakcino laŭ ofte citita studo el Israelo kaj havas daŭran efikon. Vidu ankaŭ ĉi tiun artikon en ScienceDirect, kiu kontraŭas la vakcinadon de junuloj. [12]

Eble vi pensas, ke ĝi estas « mensogaro », [13] kiel ĉi tiu doktoro aŭ eble vi pensas, ke la vakcino estas efika por maljunuloj, sed certe ne estas iu ajn kialo por vakcini junulojn. La vakcino disiĝos, ĉu ĉiu vakciniĝos aŭ ne. Malgraŭ tio, nun estas multe da cenzurado kaj stulta aŭtoritateco. Ne estas bone distingi inter la popolo kiel ĉi-tiu leĝisto pasie diras. [14]

70.000 san-laborantoj perdos laboron en Novjorko ĉar ili rifuzas vakcinon. Ĉu tio signifas ion?

Eble mi ne konvinkis vin pri io. Se la risko de morto de KroViM estas 0,00045; kaj supozu, ke la ŝanco, ke iom de miaj eldiroj estis ĝustaj estas nur 0,01. Ĉu ne pli bone lasi homojn mem decidi pri vakcinoj?

Mi ne vere pritraktis la etikajn aspektojn implikitajn en argumentoj de socio kontraŭ la individuo en ĉi tiu artikolo, ĉar ĉi-kaze ne estas klare, ke devigaj vakcinoj iel helpus je iu nivelo.

Sed kio okazus, se fakte multaj mortos pro tio, kaj multaj mortos pro tiu? Ĉu iu havas la rajton decidi pri la alia homo, kiam rilatas al eksperimento? La Nurenbergo leĝo diras ne.

Citaĵoj

- [1] Dave The Inhuman. *CENSORED VIDEO: PROF. DOLORES CAHILL - MRNA VAXXINES WILL ENHANCE ILLNESS, DISEASE & KILL*. <https://www.bitchute.com/video/kzChDH6AgHFX/>. Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. Julio 2021.
- [2] CDC. *Risk for COVID-19 Infection, Hospitalization, and Death By Age Group*. <https://www.cdc.gov/coronavirus/2019-ncov/covid-data/investigations-discovery/hospitalization-death-by-age.html>. Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. Septembro 2021.
- [3] Nishant Singh kaj Anuradha Bharara Singh. “S2 Subunit of SARS-nCoV-2 Interacts with Tumor Suppressor Protein p53 and BRCA: an In Silico Study”. In: *Translational Oncology* (Junio 2020). URL: <https://www.ncbi.nlm.nih.gov/pmc/articles/PMC7324311/>.
- [4] Mike RYAN. “The Origins Of Covid-19 & Why The Vaccines Don’t Work”. In: *Asia Pacific Today* (Septembro 2021). Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. URL: <https://www.asiapacifictoday.tv/the-origins-of-covid-19-why-the-vaccines-dont-work/>.
- [5] Jonathan WALKER. “Case Filed Against COVID-19 Vaccines in International Criminal Court, Rising Infections in Vaccinated”. In: *Vision Times* (Septembro 2021). Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. URL: <https://www.visiontimes.com/2021/09/17/case-filed-against-covid-19-vaccines-in-international-criminal-court-rising-infections-in-vaccinated.html>.
- [6] Maria POPP kaj aliaj. “Ivermectin for preventing and treating COVID-19”. In: *Cochrane Library* (Julio 2021). Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. URL: <https://www.cochranelibrary.com/cdsr/doi/10.1002/14651858.CD015017.pub2/full>.
- [7] Andrew BRYANT kaj aliaj. “Ivermectin for Prevention and Treatment of COVID-19 Infection: A Systematic Review, Meta-analysis, and Trial Sequential Analysis to Inform Clinical Guidelines”. In: *American Journal of Therapeutics* (A.gusto 2021). Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. URL: <https://www.cochranelibrary.com/cdsr/doi/10.1002/14651858.CD015017.pub2/full>.

- [8] Dzulkiifi Abdul RAZAK. “Use of Ivermectin a continuous hot topic”. In: *New Straits Times* (Julio 2021). Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. URL: <https://www.nst.com.my/opinion/columnists/2021/07/709059/use-ivermectin-continuous-hot-topic>.
- [9] Dan ASTIN-GREGORY. *WHY DO SO MANY STILL BUY INTO THE NARRATIVE?* <https://www.youtube.com/watch?v=uLDpZ8daIVM>. Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. Julio 2021.
- [10] After Skool. *MASS PSYCHOSIS - How an Entire Population Becomes MENTALLY ILL*. <https://youtu.be/09maaUaRT4M>. Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. A.gusto 2021.
- [11] Tim GIELEN. *MONOPOLY - Who owns the world?* <https://rumble.com/vmyx1n-monopoly-who-owns-the-world-documentary-by-tim-gielen.html>. Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. Septembro 2021.
- [12] Ronald KOSTOFF kaj aliaj. “Why are we vaccinating children against COVID-19?” In: *Toxicology Reports* (2021). Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. URL: <https://www.sciencedirect.com/science/article/pii/S221475002100161X>.
- [13] Roger HODKINSON. *It's all been a pack of lies*. <https://rumble.com/vlfc7e-dr.-roger-hodkinson-its-all-been-a-pack-of-lies.html>. Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. A.gusto 2021.
- [14] Leigh DUNDAS. *leigh dundas*. <https://www.youtube.com/watch?v=qVQm8JVfZOg>. Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. Majo 2021.

Ĉu mi vakciniĝu kontraŭ KroViM-19?

Jonathan COOPER, prezidanto de EFNSK

Pluraj homoj, kiujn mi konas, parolas kontraŭ la nuna « vakcina devigo » (angle “vaccine mandate”), kiu estas la postulo, ke iuj privilegioj – ekzemple manĝi en restoracio – estu disponeblaj nur por tiuj, kiuj estas plene vakcinitaj. Tiuj argumentoj baziĝas sur tri ĉefaj punktoj:

- 1 La devigo pri vakcinado estas diskriminacia, kiel ia medicina rasapartismo.
- 2 La vakcinoj estas nesekuraj, aŭ almenaŭ nesufiĉe provitaj.
- 3 La TGA (“Therapeutic Goods Administration” Terapia Var-administrado) estas sekrete regata de « Granda Farmako ».

Tamen, antaŭ ol mi respondos al tiuj punktoj, mi volas doni personan respondon.

Eĉ mi komence iomete hezitis pri Astra-Zeneca, la sola vakcino havebla por mi tiutempe, pro raportoj pri sangokoagulaĵoj kiel kromefiko. Tamen mi poste eksciis, kion diras multaj fidindaj fakuloj pri epidemiologio kaj imunologio. La grandega interkonsento estis, ke la risko de gravaj malfavoraj kromefikoj de Astra-Zeneca estis multege pli malgranda ol la risko iĝi infektata de KroViM-19 kaj tiel grave malsaniĝi. (Parenteze, homoj kutime ne lerte agas instinkte laŭ relativaj probabloj; tial prosperas la vetluda industrio kaj tial ekzistas superstiĉo. Do, ni devas pensi tre racie pri tiaj aferoj.)

Do, mi decidis esti vakcinata per Astra-Zeneca, pro amo:

- por miaj amatoj, (mia edzino, miaj infanoj, miaj genepoj, miaj gefratoj kaj miaj karaj amikoj),
- por mi mem,
- por mia komunumo kaj, preter tio, la homaro.

Nun mi respondos al tiuj tri argumentoj kontraŭ la vakcina devigo:

1 « Ĝi estas diskriminacia. »

Ĉi tio estas falsa ekvivalento. Diskriminacio (rasa, seksa, aĝa, laŭ seksa orientiĝo ktp.) baziĝas sur aferoj ekster onia regado. La afero kutime nomata « vakcina devigo » estas nur kondiĉo: Oni nur rajtas fari *A*-n, se oni havas *B*-n. Ekzemple:

- Oni nur rajtas stiri aŭton, se oni sukcesis en testo pri stirado kaj pagas por permesilo.
- Oni nur rajtas labori en malsanulejo, se oni havas aktualan hepatitan vakcinadon.

2 « La vakcinoj estas nesekuraj, aŭ almenaŭ nesufiĉe provitaj. »

Estas vere, ke vakcinoj kontraŭ KroViM-19 disvolviĝis multe pli rapide ol antaŭaj vakcinoj. Tamen, ĉi tiuj vakcinoj estis transprenitaj pli ol 3,7 miliardojn da fojoj tutmonde. Tio estas la plej granda medicina provo en la historio.

3 « La TGA estas sekrete regata de « Granda Farmako » »

Tio estas unu el multaj teorioj pri konspiroj. Tamen, kiel montris D-ro David GRIMES, de la Universitato de Oksfordo, plej multaj konspiroj estas matematike ne realigeblaj. Ekzemple, se ekzistus komploto de « Granda Farmako » kaŝi kuracon kontraŭ kancero, tio estus elmontrita post ĉirkaŭ 3,2 jaroj, pro la nombro da homoj postulataj por teni ĝin sekreta [1]. Krome, ne ekzistas tia komploto « Granda Farmako ». Estas nur pluraj kompanioj, kiuj konkuras kontraŭ unu la alia.

Se rifuzi vakciniĝi tuŝus nur la homon ne vakcinatan, tio estus en ordo. Tamen, plej multaj homoj – inkluzive de tiuj nevakcinitaj – vivas en socio kaj havas reton de familio kaj amikoj. Se mi rifuzus vakciniĝi (sen valida medicina kialo), mi riskus aliajn. Se, sekve de tio, mi malsaniĝus pro KroViM-19, aŭ eble mortus, tio terure efikus al tiuj, kiujn mi amas.

Do, konklude, esti vakcinata estas ago de amo.

Citaĵoj

- [1] Alex BEREZOW. *Maths study shows conspiracies 'prone to unravelling'*. <https://www.bbc.com/news/science-environment-35411684>. Vidite vendrede je la tridek-unua de decembro 2021. Januaro 2016.



Esperanto House
143 Lawson Street
REDFERN NSW 2016
AUSTRALIA

EFNSK

La estrarkunsido per reto
La unua dimanĉo de la monato je 11:00
Kontaktu per nsw@esperanto.org.au

Sidneja Esperanto-Klubo

Ĉe [Esperanto-Domo](#) 143 Lawson St REDFERN NSW 2016
Ĉiun sabaton je 18:00
Kontaktu per [02 9319 4775](tel:0293194775)

Manlia Esperanto-Klubo

Ĉe [Whitewater Restaurant](#) 36 S Steyne MANLY 2095
La unuaj kaj triaj sabatoj de la monato je 10:30
Kontaktu Roger SPRINGER per [02 9976 6320](tel:0299766320) aŭ manly@esperanto.org.au

Esperanto-Klubo de la Centra Marbordo kaj Novkastelo

Ĉe [Wyong Milk Factory Cafe](#) 141 Alison Rd WYONG NSW 2259
La tria dimanĉo de la monato je 12:00
Kontaktu Joanne CHO per [0413 087 340](tel:0413087340) aŭ centralcoast@esperanto.org.au

Esperanto-Klaso de Cooma

Ĉe [Snowy Mountains U3A Shop 8 \(supre\) Centennial Plaza](#)
81-97 Commissioner St COOMA NSW 2630
Ĉiun ĵaŭdon je 15:00
Kontaktu Penny VOS per [0429 170 739](tel:0429170739) aŭ penivos@yahoo.com

Esperanta Kafo-Klubo de Kanbero

Ĉe [The Pancake Parlour](#) 122 Alinga St CANBERRA ACT 2601
Ĉiun ĵaŭdon je 17:00
Kontaktu per canberra@esperanto.org.au

esperantohouse.org.au
www.instagram.com/esperanto_nsw
www.facebook.com/EsperantoNSW
www.meetup.com/Esperanto-in-Sydney

Prezidanto	Jonathan COOPER
Vicprezidanto	Andrew SPANNENBERG
Sekretario	Nicole ELSE
Kasisto	Dmitry LUSHNIKOV
Estraranoj	Alan TURVEY, Adam LEVY, Maria TERANO, Chris BETCHER

Paĝo 13 el 13